
Revuo de la Kanada Esperanto-Asocio | Numero 2016/1

# Lumo

ISSN: 0827-3154



## Enhavo | Skizo


Kanadaj novaĵoj 3

Raportoj kaj artikoloj 9

Diversaĵoj 28


## Limdato

POR LA VENONTA NUMERO

La 15a de Julio 2016

lumo@esperanto.ca

# Detala enhavo de la numero


Kolumno de la [nova] redaktorino 1

**KANADAJ NOVAĴOJ** **3**
- Anonco pri MeKaRo 3
- Anonco pri NASK 4
- Anonco pri Meetup : provu la retejon! 6
- Datreveno de Esperanto Global Auxiliary Language Fund 8
- Kanada dialogo 8


**RAPORTOJ KAJ ARTIKOLOJ** **9**
- La vojo de Sankta Jakobo 9
- Muroj 14
- Kanada literatura antologio 18
  - - Supera Lago 19
  - - La Frejzero 20

**DIVERSAĴOJ** **28**
- Esperanto-lernantoj per Duolingo 28
- MateoEksplikas : medicinaj instru-filmetoj 29
- I.S.A.E 30
- El Benino, deziras korespondi 31
- Informletero de Vinilkosmo 32


Lumo estas la revuo de La Kanada Esperanto-Asocio.
Por membriĝi en KEA, vizitu nian retejon.

**KOREKTENDAĴO**
NUMERO 2015/2

La foto sur la unua paĝo ne estas de la ĉirkaŭaĵo de William Peace universitato, kie okazis NASK; estas de la vidaĵo tra la fenestro de la ĉambro de Don McIntosh ĉe SES en Slovakujo.



# Kolumno de la [nova] redaktorino

## Lumo printempas!

### Printempo refreŝigas.

Naturo liberiĝas, verdaĵoj ŝprucas kun forteco, ĉio moviĝas kaj ŝanĝiĝas rapide. Samtempe, tiuj ŝanĝiĝoj estas la normala progreso: la vivo evoluas, denove.

Mi kredas ke nuntempe, estas iom la sama situacio por la kanada Esperanto-movado; ĝi havas novan inspiron. Estas novaj vizaĝoj, homoj kiuj entuziasmas. Estas la estraro de La Kanada Esperanta-Asocio kiu akcelas la kreskadon de la movado per sia laboro, kiu proponas multajn stipendiojn por renkontiĝoj kaj kuraĝigas komencantojn, kiu ekklopodas la organizado de UK kaj IJK en Kanado por 2019 por kunigi esperantistojn de ĉi tie kaj de aliaj partoj de la mondo!

En retejoj, troviĝas sendepende organizitaj fontoj pri diversaj fakoj kaj informkampoj. Ankaŭ ekzistas novaj kaj modernaj manieroj por organizi renkontiĝojn kaj stimuli la partoprenon en agadoj. Certe estas nova erao, sed estas la daŭrigo de la partopreno de fidelaj esperantistoj tra la lando kiu forte kontribuis – kaj kontribuas – al la kreskigo de la movado. Kiel vi povos legi en la numero, la kanada movado evoluas per kunlaboro de esperantistoj, kies celo estas ĉiam iomete pli kunigi kaj verdigi homojn.

**Mi fieras prezenti la 2016an printempan numeron de Lumo!**

Mi feliĉe havas la honoron daŭrigi la eldonadon de la revuo kaj la bonan laboron de Geoffrey Greatrex. Harmonie al la printempo, mi ankaŭ refreŝigas la aspekton de Lumo, sed pli ol nur bonigi la aspekton, mi esperas krei specialan spacon de dialogo kun la legantoj, krei ion komunan per la revuo.

Mi esperas ke vi partoprenas multege per artikoloj, raportoj, komentoj! Helpu min dislvolvi la semon de la verda passio kaj amikeco!

## Iom pri mi




Mi estas juna esperantistino el Saguenay, Kebekio.
Mi studis (kaj studos) arton kaj humanajn sciencojn; ĝenerale, mi ege interesiĝas pri sociaj rilatoj. Kvankam mia patrino estas esperantistino ekde sia 18a jaro, mi vere esperantiĝis ekde la pasinta jaro. Tiel, mi estas ankaŭ progresanto kaj mi malkovras esperantujon! Cetere, mi fiere portos la koloron de printempo kaj de esperanto, samtempe al kunporti miajn kolorojn kaj miajn ideojn. Kaj mi petas vin kunporti belajn aĵojn por enkonduki min al la movado kaj nutri ĝin! ;)

**- Kamila [Camille-Amélie Koziej Lévesque], nova redaktorino.**

# KANADAJ NOVAĴOJ



## Anonco pri MeKaRo



La urbo Granbio

MeKaRo *(Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto)* estas turisma semajnfino, kiu okazas ĉiujare, alterne en Kebekio kaj en Ontario, dum la longa semajnfino en Majo. Ĝin organizas la Esperanto-Societo Kebekia kaj lokaj Esperanto-kluboj en Kebekio kaj Ontario.

**La venonta MeKaRo okazos en Granbio, Kebekio, de la 21a ĝis la 23a de Majo 2016.** Granbio estas urbo en sudokcidenta Kebekio, situata oriente de Montrealo.

Pli da informoj ĉe mekaro.ca

# Anonco pri NASK

## NASK kaj Kino-Teatro-Festo denove kune!

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) ankaŭ ĉi-jare kunigas la fortojn kun Kino-Teatro-Festo, kaj invitas vin al unu el la plej elstaraj eventoj en Esperantujo! NASK estas la plej longdaŭra Esperanto-kursaro en Nord-Ameriko, kaj estas unu el la plej gravaj aktivaĵoj subtenataj de ESF. Ĝi estas unika kleriga evento, kiu altiras lernantojn de ĉiuj lingvoniveloj, kaj elstarajn Esperanto-instruistojn el la tuta mondo.



Partoprenantoj de NASK 2015

**La kursaro en 2016, jam la trian fojon, estos sur la bela verda tereno de la universitato William Peace en Raleigh, Norda Karolino. La plena programo okazos inter la 28a de Junio kaj la 7a de Julio, kaj la mallonga programo inter la 28a de Junio kaj la 3a de Julio.**




Vizitu la retejon nask.esperantic.org por pli da informoj pri NASK kaj kotofesto.org pri KTF.

La aliĝilo estas havebla laŭpete de la administranto de la kurso, Ellen Eddy, ĉe eddyellen@aol.com.

## LA STELA INSTRUISTA TEAMO DE NASK!

### Bertilo Wennergren
Supera kurso

Membro de la Akademio de Esperanto

Esperantisto de la Jaro 2006

Aŭtoro de la Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, Detala Gramatiko de Esperanto kaj Landoj kaj lingvoj de la mondo

Muzikisto

### Tim Morley
Meznivela kurso

Diplomita instruisto de la angla

Gvido de la esperantigo de OpenOffice

Esperanta instruisto interrete pere de italki.com

Priesperantuja adaptaĵo de la fifama kartludo Cards Against Humanity

### Lee Miller
Postbazo kurso

Profesia interpretisto de la Usona Signo-Lingvo

Partoprenanto de la kursaro ekde 2000

### Ĵenja Bondelid
Komencinta kurso

Fondintino de la Kino-Teatro-Festo

Diplomita instruistino de Esperanto ĉe la altlernejo Principia

Reĝisoro, danckompono kaj prezento sur loka scenejo en Vaŝingtonio

### Hoss Firooznia
Eksterkursaj programoj
Helpinstruisto
Redaktoro de « La NASKa Fasko »

Redaktoro de Usona Esperantisto

# Anonco pri Meetup : provu la retejon!

Estimataj membroj kaj aliaj Kanadaj samideanoj,

Mi invitas vin kaj vian klubon provi la retejon Meetup senpage dum tri monatoj, kune kun aliaj kluboj en Kanado, dum la aŭtomno de 2016. Fine de la senpaga provperiodo KEA decidos, ĉu ni daŭre uzos la servon Meetup Pro kaj rekte pagos la koston de Meetup por la kluboj.

Meetup estas la plej granda reto de lokaj grupoj en la mondo. Meetup faciligas la organizadon de lokaj grupoj, kaj helpas homojn trovi grupojn el la miloj, kiuj jam renkontiĝas vizaĝ-al-vizaĝe. Pli ol 9000 grupoj renkontiĝas en lokaj komunumoj ĉiun tagon — ĉiu kun la celo plibonigi sin kaj sian komunumon. La misio de Meetup estas revigligi lokajn komunumojn, kaj helpi homojn tra la mondo memorganizi. Meetup kredas, ke homoj povas ŝanĝi sian personan mondon, aŭ la tutan mondon, organizante sin en grupojn, kiuj estas sufiĉe potencaj por realigi pozitivajn ŝanĝojn.

Kelkaj el la kluboj jam uzas Meetup-on:

- **Esperanto-Peterborough**
- **Esperanto-Toronto**
- **Esperanto-Hamilton**
- **Esperanto-Kitchener-Waterloo**
- **Vancouver Esperanto Group**



Scrabble ludo al la Meetup renkontiĝo de Esperanto-Toronto

Iuj el ĉi tiuj kluboj estiĝis plejparte per Meetup. Aliaj ekzistis longe antaŭe, sed allogis multajn homoj per tiu retejo, kiu reklamas al siaj uzantoj grupojn, kiuj rilatas al iliaj interesoj. Esperanto-Toronto, ekzemple, bonvenigis ne nur plurajn hejmurbanojn, sed ankaŭ eksterlandajn vizitantojn, kiuj trovis ĝin per Meetup. Ĝi estas efikega maniero organizi, reklami, kaj trakti renkontiĝojn, kaj ĝi povas rapide kaj facile disvastigi la scion pri viaj renkontiĝoj al dekoj da diversaj homoj, kiuj interesiĝas pri nia lingvo.

Ni forte kuraĝigas vin provi ĉi tion, kaj ni kredas, ke ĝi povas vere helpi vin kreskigi la movadon en via regiono!

Movade salutas,
**Matthew (Mateo) Chisholm, Sekretario de La Kanada Esperanto-Asocio**

# Datreveno de Esperanto Global Auxiliary Language Fund



Gratulon kaj bondezirojn al **Esperanto Global Auxiliary Fund** okaze de sia mejloŝtona 10a datreveno, je 2016. Dankon pro la kunlaboro por konstrui vibran, prizorgeman komunumon por ĉiuj.


Kanada
ESPERANTO-REVUO
Marto-Aprilo 1962

La esperanto-grupo de Tri-Riveroj antaŭ la strattabulo de la unua Esperanto-strato de Kanado.

## Kanada Dialogo

Kiel mi skribis en la redaktorino kolumno, mi ne scias multe pri la esperanta movado en Kanado.

Rigardante tion bildon kiu montras grupon de esperantistoj antaŭe esperanta strato, mi demandas:

Ĉu estas multe da esperantistaj markoj en Kanada?
Kion estis la graveco de la movado ĉi-tie?
Kio povas esti la futuro de la kanada esperanta movado?

**Skribu al Lumo, Komencu diskuton!**



# RAPORTOJ KAJ VERKOJ

## La vojo de Sankta Jakobo

Lottie Ericson

Pasintan someron mi decidis piediri La Vojon de Sanktjakobo (Camino de Santiago). Estas multe da vojoj tien en Eŭropo kaj mi elektis komenci en Lisbono, piedirante norden al la sankta urbo, kiu estas celo de pilgrimadoj dum pli ol mil jaroj.

Kial Sankta Jakobo? Sanktan Jakobon oni senkapigis en la jaro 44 kaj liajn sanktrestaĵojn oni trovis tie en la oka jarcento; ili troviĝis en tero sub la katedralo. Homoj faris, kaj ankoraŭ faras, ĉi tiun pilgrimadon pro religiaj motivoj, sed ankaŭ multe da homoj faras ĝin pro la aventuro, pro la defio aŭ pro malmultekosta kaj interesa ferio.

Malmultekosta, jes, ĉar via transporto estas viaj kruroj, via lito estas en amasloĝejo kaj via manĝaĵo estas en malgranda restoracio aŭ per kuiro de vespermanĝo en loĝejkuirejo; ankaŭ tie necesas prepari manĝetojn por la venonta tago. Mi malkovris, tamen, ke en Hispanio miaj eŭroj malaperis pli rapide ol en Portugalio. La kialo? Portugalio estas malpli disvolviĝinta, sekve ekzistas granda diferenco en vivkostoj.

Sed klare oni devas antaŭ ĉi tiu speco de entrepreno aĉeti proprajn vestaĵojn, taŭgajn botojn, laŭmezuran dorsosakon kaj bastonojn. Mi elspezis multe da tempo por trovi bonan ekipaĵon kaj mi estis kontenta fari tion, ĉar mia dorsosako ne dolorigis min, miaj botoj donis al mi nur unu haŭt-veziketon kaj miaj bastonoj donis al mi ekvilibron por ke mi ne falu. La kosto por la flugbileto kompreneble ne estis malgranda, sed ĉar ĉi tiu pilgrimado estis en mia 'sitelo-listo' mi planis, preparis kaj foriris.

Lisbono estas belega urbo kaj post du tagoj de turismo tie, mi ekpiediris, plenespere antaŭĝojante renkonti aliajn pilgrimantojn, kiel indikis al mi amikinoj, kiuj piediris la tre popularan sudfrancan vojon tra norda Hispanio. Sed tio ne okazis. Por trovi la vojon necesis bone legi gvidlibron kaj trovi kaj sekvi flavajn sagojn indikitajn en stratoj, sur ŝildoj, fostoj kaj trunkoj. Dudek ses kilometroj sole la unuan tagon ŝajnis al mi senfinaj.

En la vespero, tamen, mi renkontis junan irlandanon kiu iĝis mia kunulo kaj je la fino de la dua tago, juna germano aliĝis al ni, kaj ni piediris kiel triopo dum la plejparto de la piedvago tra diversaj bienregionoj, kie paŝtis bovoj, ŝafoj kaj ĉevaloj.
Ni vidis ankaŭ vastajn kampojn de tomatoj kaj maizo. Estis aldone multaj hektaroj da sunfloroj (heliantoj), kiuj klinis siajn kapojn por ni. Kiam kreskis vinberoj, persikoj, oranĝoj, figoj kaj rubusoj apud nia piedirvojo ni gustumis ilin, kio helpis nian kelkfojan malsaton kaj soifon. Multaj regionoj ankaŭ konatas pro bovbataloj.



Bom Caminho,
salutvortoj inter pilgrimantoj survoje


Sunfloroj
kiuj kliniĝis por vi

La pilgrimado kondukis nin tra vilaĝoj plenaj je domoj kun belega desegnita kahelaro, kio vere plaĉis multe al mi. Kelkfoje mi havis okazon iomete paroli kun la enloĝantoj. Kiun lingvon mi uzis? Miksaĵon de la franca, de la hispana kaj de la esperanta lingvoj. Surprize, normale la portugalanoj ja komprenis min.

Ni loĝis ankaŭ kelkfoje en malnovaj kaj belegaj urboj. Mezepoka Tomar estas konata pro kastelo de la 14a jarcento, kiu apartenis al la Templanoj. Agueda, mi nomis 'La Plej Feliĉa Urbo de Portugalio' pro ĝiaj gaje koloritaj pluvombreloj penditaj super la piedirstratoj, kaj la amuze farbitaj benkoj. Oporto estas granda kaj belega urbo, tra kiu fluas la rivero Duro, kio havas malnovan placon kun katedralo unuflanke kaj vinkelojn por portovino aliflanke.




Mi trinkante de vilaĝa puto



Mi parolante kun lokaj virinoj

Santiago proksimiĝis kiam ni komencis rimarki survoje pli da konkoj, kiuj estas la simbolo de la pligrimado. La pilgrimantoj de fruaj tempoj uzis ilin kiel trinkujoj. Oni ankaŭ trovis speciale bakitajn kaj tre bongustajn pilgrimadkukojn en la bakejoj.

Antaŭ la komeco mi devis akiri pilgriman pasporton, longan paperpecon, en kiu loĝejgastigantoj metis stampojn, kiuj montris la vojon laŭ kiu mi iris. Estas tre grava prezenti ĝin plenumitan al la alvenoficejo en Santiago, por ricevi la 'Compostela', atestilon pri la pilgrimado. Post 28 tagoj kaj 620 km, la atestilo donis al mi specialan senton, kiam ĝi estis en mia mano.


Se vi havas demandojn pri la pilgrimado laŭ La Vojo de Sankta Jakobo, bonvolu sendi al mi retmesaĝon, ĉe ttlericson@hotmail.com



Konkoj en arbaro



Kukoj kun kruzoj



Mi sidante antaŭe la Sanktajacobean katedralon

# MUROJ

## Wally Du Temple

En la himno de Esperanto, Ludoviko Zamenhof mencias, kaj li eĉ abomenas murojn kaj obstinajn barojn al homara unuiĝo.

Jen la poemo, La Espero.

**La Espero**

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l'espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l'homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

Homaj civilizacioj ĉiam konstruis murojn.

En la unua jarcento, la Romia imperiestro Adriano konstruis 120-kilometran kalkŝtonan muron trans la Britia Romio. Akademiuloj ankoraŭ debatas kion Adriano intencis per tiu barilo. Iuj sugestas ke li konstruis la muron por ekskludi de sia imperio la sovaĝulojn, kiujn li malsukcesis konkeri, aŭ por kontroli komercon kaj enmigradon. Aliaj scivolas ĉu la muro havis neniun utilecon preter tute teatra esprimo de imperia potenco — spektaklo. Kalkita kaj blankigita, la muro estus brile blanka por mejloj sub la norda suno.

La Muro de Adriano daŭrigis imprese longe post kiam la gipso defalis grunden kaj la Romia Imperio cedis al tiu de la Brita. En 1754, la angla antikvaĵisto William Stukely deklaris ke la Muro de Adriano estis superigata nur per la grandioza patriarko de homaj muroj, la Granda Muro de Ĉinio. Stukely skribis, «La Ĉina Muro faras konsiderindan figuron sur la terglobo, kaj povas esti spektita de la luno.» Oni devas admiri la konfidon de dekok-jarcenta sciencisto kiu priskribas la videblecon el spaco. Tamen, lia aserto estis kaj aŭdaca kaj malĝusta: la Granda Muro de Ĉinio ne povas esti vidita de la luno. Sed la mito, kiel la Murego, daŭras.

Daŭras ankaŭ la impulso por konstrui murojn. En 1800, Danlando reuzis antikvan muron de la Vikingoj kiel armea fortikaĵo en ĝia milito kontraŭ la Prusoj. En 1870, Argentino konstruis muron por protekti la provincon de Bonaero de la invado de la indiĝenaj popoloj Mapuche. Komence de la Dua Mondmilito, Francio konstruis betonan baron laŭ ĝia limo kun Germanio por defendi kontraŭ germana atako kaj nomis ĝin la Linio Maginot. La francoj fortikigis ilian linion kun artilerio kaj kontraŭtankaj barikadoj, sed malsukcesis impresi la hitleran armeon, kiu simple marŝis ĉirkaŭ ĝi. Poste, Orienta Germanio konstruis sian propran muron.

La Berlina Muro supreniĝis en 1961, kaj ĝi dividis Orientan Germanion de Okcidenta Germanio por preskaŭ tridek jaroj.

Muroj ne nur dividas nin. Ili povas fari nin malsanaj. Ili povas peli nin al frenezo. En 1973, orientgermana psikiatro Dietfried Muller-Hegemann observis ke la Berlina Muro kaŭzis psikozon, skizofrenion, kaj fobiojn ĉe la orientgermanoj kiuj vivis en ĝia ombro. Ili suferis koleregon, deprimon, kaj alkoholismon - kaj estis pli verŝajna ke oni mortigos sin. Ju pli proksime al la muro liaj pacientoj loĝis, des pli akutaj estis iliaj malsanoj. La kuracisto donis la nomon ' la mura malsano' al la aro de malsanoj disvastiĝintaj proksime al la muro; depresio, angoro kaj ege alta tendenco al sinmortigo. Li diris ke la sola kuraco estas la defalo de la Muro.

En 1990 'emocia liberigo' estis sentita je la novembra nokto kiam la muro falis fine. Miloj de ĝojegaj germanoj grimpis la Muron, ploris, kaj brakumis unu la alian sur la pinto de la konkreta barilo, kaj daŭrigis dispecigi la Muron kun ĝoja emocio. La falo de la Muro estis la ekvivalento de emocia malhelpilo forigita, la subpremitaj emocioj venis al la surfaco.

La psika doloro kiun la Berlina Muro ekigis kaj la humiliga fiasko de la Linio Maginot jarojn antaŭe apenaŭ malkonvinkis la mondon de murkonstruistoj. En 1975, Sudafriko konstruis 120-kilometran elektran barilon, nomitan 'la Serpento de Fajro', laŭ ĝia limo kun Mozambiko, por malebligi ke la civila milito en Mozambiko transiri en Sudafrikon. La 3500-volta dratbarilo mortigis pli da homoj ol la Berlina Muro. Usono faris betonajn en Bagdado kaj konstruas muron kontraŭ Meksiko. Donald Trump, kandidato por prezidanto de Usono, volas farigi la plej altan kaj la plej bonan muron en la mondo.

Hindio konstruis murojn kontraŭ Pakistano kaj Bangladeŝo kaj en la disputata landlima regiono de Kaŝmiro. Muroj apartigas Nordan kaj Sudan Koreion kaj baras homojn el Zimbabvo el Bocvano. Israelo konstruis murojn kontraŭ Egiptujo kaj la Palestinanoj. Muroj dividis homojn de homoj en Kipro kaj Belfast. Nun pli da muroj estas ekstarigitaj en Hungario kontraŭ la rifuĝintoj kiuj fuĝis de la civila milito en Sirio. Kiam tio finiĝos?

En la nuna epoko, kiun ni ofte nomas 'la tutmonda vilaĝo' , supozeble, la baroj falas. Se jes, kial tiom da novaj muroj? La baroj al komerco kaj vojaĝado falas, kaj ni povas komuniki per reto kaj telefono ie ajn en la mondo. Programoj komputilaj por interpretado kaj tradukado de naciaj lingvoj estas pli bonaj kaj pli bonaj. Ni havas anĝelojn kaj demonojn – tiuj estas multnaciaj korporacioj, klimataj ŝanĝoj, tutmondaj terorismaj retoj, Hollywood-aj filmoj, birda gripo, poluo...

Sed la muroj ekestas daŭre.

Ludoviko Zamenhof verkis jene:

**"Forte staras muroj de miljaroj**
**Inter la popoloj dividitaj;**
**Sed dissaltos la obstinaj baroj,**
**Per la sankta amo disbatitaj."**

Nu, estas evidente, ĉu ne, ke la sankta amo ne ankoraŭ estas sentata en koroj de la homoj. Kaj se la sankta amo ne estas sentata, tiam la emo malkonstrui murojn ĉu fizikajn, ĉu lingvajn, ĉu rasajn, ĉu seksajn, ĉu ideologiajn ne estas sufiĉe forta inter la homoj.

[Prelego dum NOREK 2015]

PACO.

# Kanada literatura antologio

## Eriko Pedersen

La Viktoria Esperanto-klubo havas projekton kompili Kanadan literaturan antologion; ni esperas eldoni tion en la jaro 2019 por la Universala Kongreso en Montrealo.

Ni proponas, ke oni tradukos kvaronon de la tekstoj el la franca, kaj la cetero el la angla aŭ aliaj lingvoj. Indiĝenaj historioj ankaŭ gravas. Ĉiuj tekstoj devas esti verkitaj de kanadaj verkistoj aŭ okazi en Kanado.

Ni skribos al la tenantoj de kopirajto por obteni permesojn traduki iliajn verkojn. Ni esperas, ke estos malfacila procezo sed ne malebla; post ĉio, ni esperantigos nur mallongajn partojn de pli grandaj libroj, kaj ni diskonigos la verkistojn al esperantistaj legantoj, kiuj neniam legis la rakontojn kaj poemojn en la franca kaj la angla originaloj.

Mi esperantigis kelkajn poemojn kaj duonon de unu eseo, kaj mi esperas ke aliaj esperantistoj povas legi kaj kritiki la tradukojn. Se vi trovis erarojn, mi petas, ke vi sendu ilin al mi. Mi ankaŭ serĉas kunlaborantojn, provlegantojn kaj kontrolantojn. Dankon por via atento kaj helpo.

Jen kelkaj anglaj kaj francaj verketoj, kiujn mi esperantigis.

antologio@shaw.ca

Eriko Pedersen, 2039 Gourman Place, Victoria, B.C., Canada V9B 6A9.

## [komento de la redaktorino]

Elektitaj verkoj de la Kanada literatura antologio aperos en ĉiuj venontaj numeroj de la revuo.

Por la printempa numero de Lumo, mi elektis poemon kaj eseon pri unua el la plej granda riĉeco de la lando: la naturaj kaj abundaj akvomasoj. La riveroj kaj lagoj kondiĉas la teritoron kaj la vivon sur ĝi. Kelkfoje, ili fluas trankvile, kelkfoje, ili ŝprucas kaj la torentoj detruas la ĉirkaŭaĵon.

Certe, la diversaj akvomasoj el la lando estas fortecoj de la naturo pri kiuj aŭtoroj fascinas.

## Supera Lago
''Lake Superior''
James Reaney (1926–2008)

Mi estas la Lagego, Supero, malvarma kaj griza.
Aliaj lagoj ne havas kion tio necesigas;
al mi, nenio superas; ĉiuj estas malsuperaj.

Mi estas la Lagego, Supero, malvarma kaj griza.
Mi estas tiel malvarma, ke, ĉar mi fridigas ilin,
la knabinoj de Fort William ne povas naĝi ĉi tie.

Mi estas tiom profunda, ke se homoj dronas en mi,
iliaj parencoj ploras: "Ili neniam troviĝos."
En mi naĝas la timiga grandega lagviva sturgo.
Tenacaj, ŝrumpemaj arboj borderas la ferajn
bordojn.


Mi estas la Lagego, Supero, malvarma kaj griza.
La tranĉilo de kirurgo ne estas tiel akuta
kiel tiuj ondoj miaj, kiuj scintilas kaj brilas
lume sub patrina Luno, lume sub avina Suno.


# La Frejzero
## "The Fraser"
## Hugh MacLennan (1907–1990)

La Frejzera Rivero estis la fino de la esploradvojo. Ĉi tie okazis la kulmino de du jarcentoj de esplorado per kanuo en Nord-Ameriko.

Verŝajne neniu orientano, almenaŭ el la Maraj Provincoj, iam hejme sentos apud la Frejzera Rivero. Ĝi estas fremda al ĉio, kiun li konas, kaj same estas ĝia kamparo. Grandaj homoj pasis tra ĝia rakonto, sed ili ne kreskis el la regiono en kiu, dum mallongaj momentoj, ili parte trudis siajn volojn. Oni kronikis sovaĝajn kaj mirindajn spertojn en iuj el la malgrandaj urbetoj apud la Black Canyon (Nigra Kanjono) kaj monten laŭ enfluriveroj kiel la riveroj Thompson (Tompsono), Lilooet (Lilueto) kaj Quesnel (Kvenelo), sed iuj el tiuj hodiaŭ estas fantomurbetoj, kaj la posteuloj de la homoj, kiuj antaŭe tie svarmis kaj miksbatalis, aliloke vivas. La popolo de Svislando bezonis multajn jarcentojn por establi realan homan rilaton kun la Alpoj; la kanadanoj de la scienca aĝo bezonos almenaŭ duone tiom longe atingi la samon kun la Roka Montaro.

Tiu ĉi estas la plej ekscita kamparo en Kanado, kaj mi ne komprenas kiel iu povus viziti ajnan parton de ĝi sen sopiri reveni. Ĝia beleco senspirigas oni. Sed estis okcidentano, Bruce Hutchison, kiu komentis ke la beleco de la plej okulfrapaj partoj de la Frejzero estas tiu de koŝmaro. Tiu ĉi estas la plej sovaĝa el ĉiuj el la riveregoj de Nord-Ameriko kaj probable, la plej sovaĝa en la mondo.





La Frejzero estas monta sistemo, kaj kvankam ĝia akvokolekta areo mezuras nur iomete pli ol 220 000 kvadratajn kilometrojn, ĉi tie la ciferoj estas trompeme malgrandaj, ĉar nordaj montoj kaptas grandegajn kvantojn da neĝo, precipe se ili estas proksimaj al oceano kiel la Pacifiko. La tuta longo de la Frejzero estas 2 700 kilometroj, kaj ĝia direkto formas la literon S, kiel desegnita de viro en trema deliro. Ĝi ekas ĉe norda latitudo de 52°45′ en du malgrandaj branĉoj fluigitaj de la glaĉero de Monto Robson, tuj okcidente de la Granda Amerika Akvodislimo, kaj kiam tiuj fluigaj riveretoj kuniĝas, ili trovas direkton en kiu kuri. Tie, en la absoluta sovaĝejo de la norda Roka Montaro, la dramo de la Frejzero komenciĝas.

Kvankam la fina destino situas centojn da kilometroj sudokcidente, la Frejzero komencas sian kuregon sturmante nordokcidenten en larĝa, ŝanceliĝanta riverturniĝo laŭ la Tranĉeo de la Roka Montaro. Post ĉirkaŭ 320 kilometroj, la impetaj akvoj renkontas la nordan spronon de la Cariboo Mountains (Karibua Montaro). La akvoj balaas en sovaĝa arko ĉirkaŭ la montoj; poste ili plonĝas rekte suden. Furioze tordante, kun nur kelkaj mallongaj paŭzoj de relativa trankvilo, la Frejzero muĝadas dum 640 kilometroj malsupren al la malgranda urbeto Hope (Espero), kiu komencis sian ekziston kiel interŝanĝejo de la Kompanio de la Hudsona Golfo – bone nomita, kiel tiom multaj el tiuj interŝanĝejo estis, kiam oni pripensas tion, kiu atendis vojaĝanton, kiu iris norden antaŭ ol la vojoj konstruiĝis. Ĉe Espero la Frejzero finfine rompas el sia monta kaptilo.


Al geografo tio, kio okazas ĉi tie, estas unu el la plej ekscitaj naturaj spektakloj en Kanado. Ene de distanco de kilometro la tuta karaktero de la rivero ŝanĝiĝas, kaj tiu tiranosaŭro de rivereto fariĝas dolĉa kaj milda. En larĝa valo brilanta en la suno, kun la sama larĝo kiel tiu de la Sankta-Johano sude de Frederiktono, la Frejzero trankvile sinuas tra la plej bela terkultivada valo en la lando. La aero estas plaĉe varma, la gebovoj estas tiel sveltaj kiel en herbejo de la angla graflando Kembriĝo, kaj la neĝaj montpintoj estas olimpecaj en la sekura distanco. Dum tiuj lastaj 130 kilometroj la rivero transiras la plejparton de homa Brita Kolumbio, ĉar la plejparto de la brita-kolumbianoj vivas en tiu bela angulo kaj en la ĝemelaj urboj ĉe la estuaro. En la fino de sia kurso, la Frejzero estas la maljuna Reĝo Lear sen la kolerego.

Sed antaŭ ol la oceano englutas ĝin, ricevante ĝian akvon tra surprize malgranda delto, la rivero faras unu finan aserton de sia vera karaktero. Dum kilometroj ĝi makulas la puran salakvon de la Georgia Markolo per la malpura flava ŝlimo, kiun ĝi elŝiris el la montoj laŭ la tuta distanco de la Karibua Montaro al la fino de la Frejzera Kanjono en Espero.

“Se rivero povus flui sur la Luno,” mi pensis, dum mi flugis super la Nigra Kanjono, “ĝi probable aspektus ĉi tiel.”

La ideo ne estas tiel neverŝajna kiel ĝi aspektas, ĉar de altitudo de ses kilometroj, multe de la regiono ĉirkaŭ la centra Frejzero ŝajnas egale ĥaosa kaj sencela kiel la luna surfaco vidata per teleskopo. Tiuj montpintoj, kiuj inspiras onin kiam oni rigardas ilin el la





grundo, estas severaj, malfekundaj krestoj de roko kie nenio vivas. La valoj kie la kanadaj cervoj paŝtiĝas kaj la rojoj kaskadas estas kruelaj cikatroj. El la aero la Roka Montaro estas malofte bela.

Tamen la aero estas la plej bona loko studi la Frejzeron, se oni deziras kompreni la logikon de ĝia kurso. Surgrunde, kiam oni veturas laŭ la nekredebla ŝoseo, kiu kreskiĝis el la malnova Cariboo Road (Karibua Vojo), la rivero ŝajnas veni al oni el ĉiuj direktoj, kaj la vojo laŭlonge de ĝi tordiĝas kiel helica ŝtuparo, tiel ke je malhela tago, sen la Suno por indiki la direkton, oni ofte ne scias, ĉu oni veturas norden aŭ suden. Sed el la aero la tordiĝoj en la rivero vidiĝas esti perfekte logikaj.

La neceso de ĉiu rivero estas flui malsupren al la marnivelo per la laŭeble plej mallonga vojo, kaj tio ĉi povas varii de milda sinuado en fiksa direkto al turmentata kurso tra ĉiu kompaspunkto ĝis la celo estas atingita. La Frejzera tereno estas la plej malfacila el ajna granda rivero en Ameriko, eble el iu ajn en la mondo, kaj same estas ĝia problemo.
El la aero oni vidas kiel ĝi solvas la aferon. Ĉar ĝia tuta kurso krom la finaj 130 kilometroj kuŝas en monta labirinto, kie la pintoj kaj montaroj laŭvorte ŝancelas unu la alian, la Frejzero devas flankpasi kreston post kresto, kaj en iuj lokoj bori vojon tra apikaj rokmuroj. El la aero oni vidas ĝin kiel tre flavan, tre maldikan serpenton, kiu aspektas kvazaŭ ĝi mortis post konvulsii en roka kaptilo. El la aero ne estas vivo en la Frejzero, kaj ĝi tute ne aspektas kiel rivero.

Surgrunde ĝi eksplodas kun vivo, kaj estas mirinda diverseco en la spektaklo tra kiu ĝi fluas. Tie ĉi la koloroj estas tiel aŭdacaj kaj fortaj — salvia verdo, oranĝo de sabloŝtono, bluverdo de cugo kaj abio, bluo de diafanaj ĉieloj, lolia verdo sur la maloftaj altaĵetoj kie la gebovoj paŝtiĝas — ke vizitanto el la oriento sentas sin transirinta en pli grandan, pli helan, pli ekscitan ekziston. La sovaĝaj floroj estas belaj laŭ la Frejzero, la vento sonas kvazaŭ la montoj spiras, la tagiĝoj kaj sunsubiroj estas tiaj, ke oni povas nur fiksrigardi ilin en silenta miro. Tiam oni rigardas malsupren en la krutan tranĉeon — en multaj lokoj oni rigardas el mil metroj — kaj oni vidas la entrudinton. Tiu furioza, ŝaŭma akvo, skandale flava kontraŭ la verdo — de kie ĝi venis, kaj kiel ĝi venis tien ĉi?

Tiu ĉi sovaĝaĵo! Sur ĉiuj el la riveregoj oni atendas iufojan turbuladon, kaj oni supozas ke ĉiuj montaj rojoj estas kataraktoj. Riveroj kiel la Sankta-Laŭrenco rapide kvietiĝas post siaj rapidfluoj, kaj montaj riveretoj kiel la Kicking Horse (kalcitranta ĉevalo) estas malprofundaj kaj mallongaj. Tamen la Frejzero estas nek mallonga nek malprofunda. Ĝi fluas kun katarakta forto dum pli ol 950 kilometroj kun nur kelkaj paŭzoj de relativa kvieteco. Iusence la Frejzero tute ne fluas: ĝi bolas antaŭen kun kirlakvoj tiom furiozaj ke ŝtipo, kiu iras malsupren laŭ ĝi, eble ĉirkaŭirus la saman lokon dum tagoj kvazaŭ kaptita en likva karuselo. Ĝi muĝas kiel oceano en ŝtormo, sed oceanaj ŝtormoj elblovas sin, dum la Frejzera muĝo estas porĉiama.






Tiu ĉi estas la plej senrimorsa naturforto en Kanado, kaj ĝia efiko sur persono, kiu vojaĝas apud ĝi, estas kurioza. Veturante norden en sia aŭto, oni tordiĝas dum horo post horo ĉirkaŭ unu harpingla vojturno post la alia. Iuj el ĉi tiuj vojturnoj ĉirkaŭ l'apogiloj de la krutaĵo povas akvigi la genuojn de altaĵtima vojaĝanto, kaj mi mem ĝojas, ke mi povis vojaĝi de Lytton (Litono) ĝis Lilueto antaŭ ol oni plibonigis la vojon al la larĝo de ŝoseego. Preter Yale, preter Spuzzum kaj Boston Bar, tra Litono al Lilueto tiu turniĝa ŝoseo prenis onin, kelkfoje tra tuneletojn en la krutaĵo mem, unufoje aŭ dufoje ĉirkaŭ mallarĝa vojturno kun negardita rando kaj krutaĵo de mil metroj malsupren — la vojo estas preskaŭ tiel ekscita kiel la rivero mem — kaj oni memoras, ke en iuj el ĉi tiuj urbetoj, nun kvietaj kaj duonvivaj, miloj da senesperaj homoj iam vivis tiel danĝere kiel soldatoj en milito, kiam ili orlavis per pato tiun riveron. Iomete preter Litono, la vojo foriras de la rivero, kaj se oni deziras sekvi la akvon, oni devas forlasi sian aŭton kaj veturi per trajno laŭ la Pacific Great Eastern Railway (Pacifika granda orienta fervojo). Kilometrojn norde, la vojo kaj la rivero rekuniĝas ĉe Macalister.

Tutdume kaj laŭ ĉiuj ĉi kilometroj la Frejzero estas influinta onin. Foje oni estas tiel proksima al la akvo, ke ĝia flava malbonvolo bolas en onia subkonscion, sed plejofte oni estas tiom alta ke ĝi aspektas tiel senmova kiel ĝi ŝajnas el la aero. Preskaŭ neniam ĝi ŝajnas, ke ĝi devus esti kie ĝi estas. Tamen ĝi estas tie, kaj post kiam oni pasigis plurajn tagojn apud ĝi, la Frejzero sin trudas ankaŭ en onin mem, kaj oni emas vidi ĝin en la dormo.

La Frejzera Rivero, kiu ŝajnas absolute malamika al la homaro kaj ĉiuj ĝiaj farAĵoj, estis tiom grava por Brita Kolumbio kiel la Sankta-Laŭrenco estis por Kebekio. Tiu ĉi estas ankoraŭ plia el la mirindaj faktoj pri ĝi. En sia libro pri la rivero, Bruce Hutchison argumentas ke la Frejzero preskaŭ kreis la provincon. Tiel, iusence, ĝi faris tion, kaj en maniero imponega al homoj el pli kvietaj regionoj.

Frejzeraj salmoj, kiuj vivtenis Indianan kulturon longe antaŭ ol la blankuloj venis, hodiaŭ donas al Brita Kolumbio pli riĉan fiŝkaptan industrion ol tiu de la tri Maraj Provincoj entute. La vivociklo de la nerko, ankaŭ konata kiel la ruĝa salmo aŭ la bludorsa salmo, estas unu el tiuj naturaj dramoj tiel elvokaj, ke ĝia simbolismo mem pasas tro proksime al la homa artiko por mensa komforto. Oni tiel ofte kaj bone rakontis pri la salma lukto supren la riveron por fraji kaj morti, ke mi ĉi tie ne ripetos tion. Ĉiu, almenaŭ ĉiu en Brita Kolumbio, scias pri la fiŝŝtuparetoj ĉe Hell's Gate (la pordo de Infero); pri la videble vivoŝvela rivero kiam la grandaj kunnaĝadoj envenas; pri la enfluriveroj, kiuj sangoruĝiĝas kiam la fiŝoj mortas dum ili vivigas novan generacion; pri la ursoj, kiuj vadas en la malprofundaĵojn por manĝi ilin; pri la maskloj, kiuj batalas unuj la aliajn reciproke por la privilegio morti apud la femaloj de sia elekto; kaj pri la fetoro, kiu poluas la sovaĝejon kiam la korpoj putradas.





En la supraj etendaĵoj la morta procezo de la salmoj ofte estas tiom progresinta, ke ili ne manĝeblas de homoj; kaj oni faras la grandajn kaptojn en la maro, kiam la fiŝoj estas helaj kaj fortaj naĝante al la estuaro, aŭ en la plej malaltaj etendaĵoj apud Mission (Misio) antaŭ ol la fina mortimpeto komenciĝas.

Frejzera oro, malkovriĝinte en 1856 aŭ 1857 (la preciza dato estas necerta), kaŭzis periodon de suferado eĉ pli malbona ol Itiu registrita pri la Alaska orimpetego. Tiel terura kiel la Chilkoot Trail (Ĉilkuta pado) estis, ĝi ne estis tiel kruela kiel la Frejzeraj rapidfluoj, kiujn tiuj heroaj stultuloj baraktis laŭiri sur flosoj. La kvanto de oro, kiun oni elprenis de la sablobenkoj kaj ercvejnoj ĉe Yale, Boston Bar, Barkerville kaj la riveroj Thompson kaj Lillooet estis bagatela kompare kun la suferado kaj heroeco kiuj pagis por ĝi, kaj la unuopaj riĉaĵoj estis neniom pli daŭraj ol orimpetegaj riĉaĵoj ie ajn aliloke. Tiu rakonto estas ankaŭ tro konata por postuli ripeton.



# Diversaĵoj

## Esperanto-lernantoj per Duolingo

Oni diskutas pli kaj pli de la nova spiro de la esperanta movado, kies multaj novaj aliĝantoj malkovris kaj lernis rete.


Nuntempe, Duolingo estas videble unu el la plej ŝatataj retaj lingvolernejoj. Enkadre de la malfermita programo, beta-fazo de esperanta kurso por angleparolantoj estis kreita antaŭ kelkaj monatoj. Kvamkam ke la kurso estas en sia testa periodo, ĝi havas impresan aliĝonombron : ĝi jam superas 325 000 lernantoj. Inter ili, ĉiutage, 5000 aktive lernas kaj 30 diplomiĝas. En venontaj jaroj, kursoj por hispanlingvanoj, ruslingvanoj kaj ĉinlingvanoj estos lanĉitaj. Certe, tiuj statistikoj entuziasmigas, sed ĉu la portreto estas reala kaj la lernaj programoj alportos konkretajn rezultojn?

Chuck Smith, la gvidanto de la Esperanto-teamo por la Duolingo-kurso, respondis al la demandoj de Lu Wunsch-Rolshoven.
Legu la kompletan intervuon ĉe Libera folio.

# MateoEksplikas : medicinaj instru-filmetoj

Khan Academy estas reto kiu proponas diversajn materialojn por libera klerigado, kaj ilojn kiujn enkondukas al komputilaj animacioj, retaj teknologioj, ktp. De la komenco, la kanadano Matthew Orlowski tradukis kaj subtekstigis kelkajn sciencajn filmetojn de tiu reto, kaj ekde unu monato, li eĉ decidis produkti siajn proprajn filmetojn pri medicina instruado. Sur lia jutuba paĝo MateoEksplikas troviĝas enkonduko al la koro kaj la klarigo de la koraj kameroj kaj valvoj.

Gratulon por lia iniciativo, espereble troviĝos baldaŭ sur lia jutubo paĝo novaj filmetoj!




Filmeto #02 - Kvar Kameroj, Kvar Valvoj

# Internacia Scienca Asocio

La Internacia Scienca Asocio Esperanta (**ISAE**) estas fakasocio pri sciencoj, alinĝinta al UEA kaj fondita en 1906. Unu el la tre malmultaj asocioj pri sciencoj, ĝi eldonas la revuon «Scienca revuo» (mallongigita SR-o) ekde 1949.

Konktaku nin por aliĝi senpage al la asocio kaj ricevi la revuon. Ankau subtenu nin per donaco kaj kontribuu al eldono de sciencajartikoloj de SR-o!

aktuale.scienca-revuo.info



# El Benino, deziras korespondi







**Sinjoro O. K. Guy ABALLO**
Entuziasmulo pri esperanto
El Paraku, Benino

Deziras korespondi kaj interŝangi por polibonigi lian lingvoscion kaj koni unu la alian.

Esperas favoran sekvon.

agbaossy@yahoo.com

# Informletero de Vinilkosmo

Vinilkosmo estas reto kiu disvolvas esperantan muzikon kaj permesas aĉeti kaj elŝuti albumojn aŭ aliajn produktojn tra reta katalogo.

En ĝia lasta informletero, Vinilkosmo anoncas kelkajn novaĵojn, inter aliaj la novajn albumojn de **Kajto**, **Veselin Damjanov & Joëlle Rabu**, **Martin & la talpoj**, **Jhak Le Puil**, **Jim Petit**, **Maragan'**, **Manuel** kaj finfine, **Kapriol'!** .

La specializita reto ankaŭ proponas al ŝatantoj de muzik-elsendfluo (streaming) diversajn novajn formulojn de abonklubo.

Por pli da detaloj, vizitu la reto vinilkosmo.com kaj ĝoju la esperantan kulturon!

Nu. Ĉi-tie finiĝas la revuo.

Komentu ĝin, skribu al ni, sendu tekstojn, kaj atentu la someran numeron de Lumo!

